


La plej malnova restanta panela ikono (6a jc).
Monaĥejo de Sankta Katarina, monto Sinajo.



La viro en la mortotuko, Torino.



Bildoj pri Jesuo

Kiel ni perceptas Jesuon?

Murpentraĵo el 4a jc en la katakomboj de Romo.
Unu el la unuaj bildoj kiuj montras Jesuo kun barbo.



Jesuo kaj la riĉa viro (Marko 10.). El Ĉinio.



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420 311 241 406;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono:
pagante rekte al KELI €16,- • pagante al
Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj
per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA
por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de
"KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale":

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; 281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

La kareso	51
Inkunabloj en Esperanto	52
Ĉu ekzistas la arkeo de Noa	53
Nova vivo	57
Evangelia Eklezia Foiro	58
Skizoj pri filozofoj-kuracistoj VIIIb	60
El nia arĥivo – sur recepton	61
Kara Redaktoro	63
Raportoj kaj informo pri la kongreso en Svitavy	64
Informetoj	70
Invito al seminario – TOLE	71
En Kristo feliĉaj	72

REDAKTORAJ VORTOJ

Iom malfruas la gazeto pro divesaj
kaŭzoj, mi pardonpetas.

Kiel kutime la gazeto havas variajn
artikolojn. Laŭ mi la artikoloj ankaŭ
reprezentas la multflankajn vidpunk-
tojn de nia kredo. Por mi tio signifas
riĉecon kaj en la gazeto kaj precipe en
mia/nia vivo. Ne ekzistas nur unu
“bildo” pri nia kredo – kiel ni devas
kredi kaj sekve opinii pri la kredo de
aliulo. Lastatempe mi spertis en du
aliaj cirkonstancoj ke homoj volas bari
aliajn opiniojn ĉar ili ne kongruas aŭ
supozeble konkurencas. Ankaŭ pri
konfesioj eblas havi diversajn vid-
punktojn kaj malsamopinii pri la
“ĝusta” kredo. Mi ĝojas ke en nia
gazeto vi povas legi diversajn temojn
kaj kredesprimojn. Daŭre mi esperas
ke la ricevotaj artikoloj formu buntan
florbukedon por ĉies ĝuo kaj ĝojo.

Mi esperas al vi bonan someran
tempon kaj espereble ni renkontiĝos
dum la kongreso en Ĉeĥio.

Julia SIGMOND, RO/IT

La infanetoj ricevas multajn karesojn. Kaj la patrinoj kaj aliuloj karesas ilin. Eblas al kutimiĝi kaj ekami la karesantan manon.

Poste ankaŭ ili karesas, unue la patrino, poste ankaŭ aliulojn. Ili ek-lernas karesi.

Kiel belega estas tiu ĉi vorto!

Kaj kiel mirinda estas la sento, kiam nin, plenkreskulojn iu ekkaresas. Ni sentas la varmon fluantan polmon kaj tiun neniam enuigan amon, kiun konstante ni bezonas. Kaj ni sentas la forton de la kontraŭ ni radianta energio.

Tute alian vivon havas tiu homo, kiu ricevis multajn brakumojn kaj karesojn en sia infanaĝo.

Male, kiel tristiga estas la sorto de tiuj sennombraj malfeliĉuloj, kiuj spertis la batojn. Anstataŭ kareso la frapon.

Poste oni miradas, ke la infanoj konstante interbatalas. Oni eĉ ne pensas, ke ni, la plenkreskuloj kulpas pro tio. Ĉar ni ne karesis sufiĉe multe la infanojn. Pri tio eĉ ne parolante, ke ni permesas al ili rigardi la televidon, por ke ili ĉiutage “lernu”: anstataŭ karesi, oni devas frapi.

Por la solece vivantaj gemaljunuloj mankas multaj aferoj. Ne nur la mono, sed ankaŭ la bonaj vortoj. Oni ne povas imagi, kion signifas por ili ricevi ĉirkaŭbrakon aŭ kareseton.

Ne nur okaze de naskiĝtago ni donu donacon!

Ankaŭ la labortagojn eblas transformi al festotagoj, per simpla donackareso.

Ni portu nian koron en nia polmo!



El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

23. junio

Sankta Patro, benu min por ke mi estu beno por aliaj. Torentoj de vivanta akvo eliru el mi. Mi portu al la homoj en malfacilaj cirkonstancoj veran ĝojon. Mi estu kiel fonto, kiu refreŝigas la soifantan vojaĝanton

Tiun-ĉi libreton Vi povas mendi ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 2). Per la aĉeto Vi subtenas la agadon de Stichting Zienderogen, kiun iniciatis Jacques Tuinder.



Inkunabloj en Esperanto

Ed BORSBOOM, NL

La unuajn presitajn librojn en naciaj lingvoj oni indikas per inkunabloj. Estis la franco, Gaston Waringhien, kiu transprenis tiun nocion por la Internacia Lingvo. Li mem skribis: *Ofte venis al mi la ideo, ke ankaŭ nia Esperanto povas pretendi siajn inkunablojn. Pravigon por tiu pretendo: temas pri la absoluta komenciĝo de unu lingvo, fenomeno unika en la homa historio.*

Laŭ mi lia grava argumento pro la atentigo kaj okupiĝo pri inkunabloj estis la fakto, ke la libroj, naskitaj en tiuj lulil-jaroj de Esperanto fariĝis ne nur raraj sed ofte tute ne plu ekzistas. Ni prenu ekzemple la pra-broŝuron, kiun Zamenhof sendis al diversaj personoj, por konatigi sian projekton. Tiu kreaĵo ricevis poste la nomon “Unua Libro”.



De ĝi nun probable ne plu ekzistas unu sola ekzemplero. Petro Stojan ankoraŭ disponis unu, kiam li kompilis dum 1926-1929 sian “Bibliografion de Internacia Lingvo”. Sed hodiaŭ en 2013, kie ĝi kuŝas? Almenaŭ ne

en la esperantaj bibliotekoj en Vieno aŭ Rotterdam. Ni esperantistoj devas savi tiajn trezorojn. Jam temp’ está. Waringhien prave rekomendis eksciti la deziron de kolektemuloj, aĉeti kaj ŝirmi la maloftajn binditaĵojn el la frua epoko de la lingvo.

En kiu periodo aperis esperantaj inkunabloj? La komenco ne starigas problemon. Zamenhof publikigis en 1887 sian manuskripton pri Esperanto. Sed ĝis kiam ni parolas pri inkunabloj? En septembro 1889 eliris la unua gazeto en nia lingvo “La Esperantisto”. Zamenhof multe kontribuis al ĝi, i.a. kompilis liston kun la libroj, kiuj ĝis tiu momento estis presitaj “Nomaro de l’ verkoj pri la lingvo internacia Esperanto”. En tiu ĉi registro troviĝas 29 titoloj.

Waringhien proponis, ke tiun precize fiksitan serion oni indikas per inkunabloj, sekve ĉio aperinta antaŭ la 1-a de septembro 1889.

En pli posta vivofazo la franca eseisto mem elektis laŭ mia memoro novan jaron, nome 1900. Lia rekonsiderita dato ŝajnas al mi tute akcepteble fina limo, ĉar kajeroj de antaŭ tiu tempo same kiel la menciita dudeknaŭo apenaŭ nun ekzistas. La sporadaj ekzempleroj el la deknaŭa jarcento emocie instigu la interesitan samideanon, preni tiajn unikaĵojn en la mano. Kia peco de verdstela historio! ☪

Ĉu ekzistas la arkeo de Noa?

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

La mondfama rusa verkisto, Aleksandro Solĵenicin, faris prelegon al la studentoj kaj profesoroj de la usona universitato Harvard je la frua parto de la jaroj okdek. S-ro Solĵenicin diris en tiu parolado ke se li estus demandata pri la kialo por la kruelaĵoj de la germanaj nazioj kaj pro la sesdek milionoj (60,000,000) da viktimoj mortigitaj de la rusaj komunistoj, li respondus ke la modernaj homoj estas forgesintaj Dion. Jesuo Kristo aludis al tio kiam Li diris: *“Kaj kiel estis en la tagoj de Noa, tiel estos en la tagoj de la Filo de homo. Oni manĝis, trinkis, edziĝis, edziniĝis, ĝis la tago, kiam Noa eniris en la arkeon, kaj venis la diluvo kaj pereigis ĉiujn”*



(Luko 17: 26, 27).

Jesuo ne menciis la maljustaĵojn per kiuj pleniĝis la tero en la tagoj de Noa (Genezo 6: 11). Sed Li menciis la normalajn agadojn de la vivo. La homoj en la tagoj de Noa estis tro okupataj pri tiuj aferoj kaj ili forgesis Dion. El tiu fekunda tero eksteriĝis la maljustaĵoj pro kiuj Dio sendis la Diluvon.

Ekzistas multaj pruvoj ke monda diluvo okazis. Fosilioj de maraj bestoj estas trovitaj en dezertoj kaj alte sur la montoj kie la Diluvo delasis ilin. Plue, multaj popoloj el diversaj tempoj kaj lokoj havas legendojn similajn al la historio de Noa kaj la Diluvo en la ĉapitroj 6 – 9 de Genezo. La babilonanoj, egiptoj, asirianoj, persoj, hindoj, grekoj, ĉinoj, polinezianoj, kaj la indiĝenoj de Nordameriko kaj Sudameriko ĉiuj havas legendojn pri granda diluvo kiu detruis la tutan homaron escepte de unu familio.

En ĉi tiu artikolo estas rakontitaj okazoj el la 20-a jarcento kaj el la 19-a jarcento kiam homoj vidis la Arkeon de Noa. (La sekvanta informo estis ĉerpita el la libro “Noah's Ark: Fable or Fact” [La Arkeo de Noa: Fablo aŭ Fakto] de V. M. Cummings.)

La fotoj kiuj malaperis

La inĝeniero George J. Greene flugis per helikoptero, farante inspektadon por

sia petrola kompanio. Je la fino de la somero de 1953, S-ro Greene estis en la oriento de Turkujo. Dum tiuj momentoj, la helikoptero portis lin ĉirkaŭ la nordorientan flankon de la fama montaro Ararat kie la Biblio diras ke la Arkeo (ŝipo) de Noa kuŝis post la granda Diluvo (Genezo 8:4).

Dume ke la suno subiĝis, ĝiaj radioj lumigis la proun de grandega ŝipo kiu kuŝas sur rifo de roko en la monto. Nur unu flanko de la granda strukturo vidiĝis sed ĝiaj ĉarpentlignoj estis klare videblaj. “La Arkeo. Certe mi vidas la Arkeon de Noa!” pensis la miregita inĝeniero dum li rememoris la rakontojn el la Malnova Testamento kiujn li lernis kiam li estis knabeto. Feliĉe, S-ro Greene havis atingeblajn de la mano fotografilojn tre bonajn de sia kompanio. Ordoninte al la piloto ke li plu alproksimigu la helikopteron al la objekto tie malsupre en la monto, li faris serion de fotografiaĵoj, iujn nur 30 metrojn distance. Tiel la inĝeniero elportis pruvojn nerefuteblan pri la antikva kaj

grandega ŝipo kiun li eltrovis.

Dum la sekvantaj jaroj, S-ro Greene montris al siaj amikoj la fotografiaĵojn kaj la mapojn kiujn li faris de tiu regiono. Kvankam multaj el ili kredis lin, li neniam sukcesis organizi ekspedicion por reiri al Turkujo por serĉi la Arkeon. Fine, S-ro Greene foriris al Sudameriko kie li mortis la 27-an de decembro de 1962, naŭ jarojn post sia grava eltrovaĵo. Ankaŭ liaj fotografiaĵoj malaperis .

La intereso de la sovetaj regantoj

La doktoro kaj kuracisto Donald M. Liedmann, filo de gepatroj judaj rusaj, renkontis en 1947 en Hamburgo, Germanio, majoron de la aera armeo de Sovetunio. Dum la dua Mondmilito, la soveta oficiro havis sub sia aŭtoritato tri aviadilojn kiuj flugis en specialaj ekspedicioj super la montaron Ararat. La oficiro klarigis al la usona doktoro ke nur estas inter 30 kaj 38 tagoj jare kiam la glaciriveroj en tiu regiono degelas sufiĉe por prezenti bonajn kon-



diĉojn por fari fotografaĵojn. Dufoje, la majoro montris al doktoro Liedmann fotografaĵojn de la montaro Ararat, faritajn je altitudo de 4.000-4.500 metroj. Ĉiuj fotografaĵoj prezentis grandan ŝipon kiu – la majoro diris – estas la Arkeo de Noa. Unu el la fotografaĵoj prezentis sekcion preskaŭ 30 metrojn longan kiu estis libera el la glacirivero. Kial la intereso de la soveta registaro pri la Arkeo?

La soldatoj de la caro kaj la arkeo

La montaro Ararat estas proksime al la landlimo de Rusio. Dum la Unua Mondmilito, la rusa armeo invadis Turkujon kaj ĝi etendis siajn liniojn de batalo preter tiujn montaron. Rusa aviadisto raportis ke dum flugo kiun li faris proksime al Ararat li vidis ion kiu ŝajnis esti grandega ŝipo. Kiam la Caro ricevis la raporton, li sendis ekspedicion de 150 viroj por serĉi la lokon. Post monato de granda penado, la ekspedicio trovis la Arkeon je la fino de decembro de 1917.

Estis konstatite ke la Arkeo havas longon de 160 metroj, larĝon de 25 metroj, kaj alton de 15 metroj. La postaĵo estis plenplena de glacio. Sed la ekspedicianoj povis eniri la ŝipon per pordo farita proksime al la pruo. Ili trovis multajn ĉambrojn grandajn kaj malgrandajn. Estas grandegaj ĉambroj kun baraĵo de trunkoj, por bestoj grandaj kiel elefantoj, rinoceroj, k.t.p. En la ĉambroj estas kaĝoj en vicoj de la planko ĝis la plafono. La kaĝoj havas makulojn de rusto kie estis ferovergoj antaŭe. La Arkeo estas konstruita de ligno tre malmola simila al cipreso. Ĝi estas

kovrita ekstere kaj interne per io simila al vakso kaj verniso.

Tuj, oficiro estis sendita al la Caro kun fotografaĵoj kaj aliaj dokumentoj pri la esplorado. Sed jam eksplodis la revolucio bolŝevista kaj la Caro, mal-liberigita, baldaŭ estis mortigita kaj ne povis vidi la rezultojn de la ekspedicio. Estas onidiroj ke la mesaĝisto estis kaptita kaj pafmortigita, kaj ke lia raporto alvenis en la manojn de Trockij, la ĉefkomandanto de la Ruĝa Armeo.

La sciencistoj kaj la arkeo

En la jaro 1916, Haĵi Jeram, armenano kiu loĝis en la ŝtato Kalifornio de Usono, antaŭ ol li mortis, rakontis la sekvantan rakonton al tiuj, kiuj lin zorgis. La gepatroj de Haĵi Jeram antaŭ multaj jaroj loĝis proksime al la montaro Ararat. Laŭ la tradicioj de la armenanoj, iliaj prauloj devenis de tiuj kiuj eliris el la Arkeo de Noa. Dum iuj jarcentoj post la Diluvo, la antikvaj armenanoj jare kutimis pilgrimi al la Arkeo por fari oferojn kaj adori Dion.

Unufoje, la malamikoj de Dio deziris detruji la Arkeon. Sed kiam ili alproksimiĝis al la loko, okazis grandega ŝtormo kun forta pluvo, kiu forviŝis la vojeton kaj kun fulmoj, kiuj detruis la rokojn. Ekde tiu tempo, la armenanoj ne plu pilgrimis al la Arkeo. Komenciĝis la kredo inter ili ke Dio deziras kaŝi ĝin ĝis la fino de la mondo estos proksime kaj tiam ĝia ekzisto estos revelaciita al la tuta homaro. Tamen, ŝafistoj kaj ĉasistoj de tempo al tempo venis rakontinte ke ili vidis la Arkeon en valo tre supre en la monto.

Kiam Haji Jeram estis junulo, proksimume en la jaro 1856, tri fremduloj alvenis al lia hejmo. Ili estis sciencistoj, kiuj faras ekspedicion speciale por pruvi, ke la Arkeo ne ekzistas kaj ke la legendo pri la Diluvo estas mensogo. La junulo kaj lia patro supozis ke jam

estis tempo por montri al la mondo, ke la Arkeo ankoraŭ estas tie sur la monto. Tial ili konsentis gvidi la sciencistojn al ĝi.

Post longa marŝado malfacila kaj danĝera, la grupo alvenis al valo kie pruo de grandega ŝipo estis videbla

(Dua Epistolo de Petro 3: 3-13)

Unue sciante, ke en la lastaj tagoj mokemuloj venos kun mokado, irante laŭ siaj propraj voluptoj, kaj dirante: Kie estas la anonco de lia alveno? Ĉar de kiam la patroj endormiĝis, ĉio restas kiel de post la komenco de la kreo.

Ĉar ili volante forgesas, ke la ĉielo ekzistas de antikve, kaj tero kunmetita el akvo kaj meze de akvo, laŭ la vorto de Dio; per kio la tiama mondo, diluvite, pereis; sed la nuna ĉielo kaj la tero per la sama vorto estas destinitaj por fajro, rezervate ĝis la tago de juĝo kaj perejo de malpiuloj.

Sed ne forgesu ĉi tiun unu aferon, amataj, ke ĉe la Sinjoro unu tago estas kiel mil jaroj, kaj mil jaroj kiel unu tago.

La Sinjoro ne malrapidas pri la promeso, kiel iuj malrapidecon kalkulas; sed paciencaj al vi, volante, ne ke iuj pereu, sed ke ĉiuj venu al pentoj.

Sed la tago de la Sinjoro venos, kvazaŭ ŝtelisto; en tiu tago la ĉielo forpasos kun muĝa bruego, kaj la elementoj brulante solviĝos, kaj la tero kaj la faritaĵoj en ĝi forbrulos.

Ĉar tiamaniere ĉio tio solviĝos, kiaj homoj vi do devus esti en sankta konduto kaj pieco, atendante kaj akcelante la alvenon de la tago de Dio, pro kio la ĉielo flamanta solviĝos, kaj la elementoj per fajra brulado fluidiĝos?

Sed laŭ Lia promeso ni atendas novan ĉielon kaj novan teron, en kiuj loĝas justeco.

Malgraŭ la mokado de multaj homoj, la reveno de Jesuo Kristo estas certa, tiel certa kiel okazis la Diluvo. Ĉar ni vivas en la atoma erao, estas facile kompreni ĉi tiun profetaĵon, ke la nuna mondo pereos per fajro. Se ni sole interesiĝas por la nuna vivo kaj por akiri materialajn varojn, ni vere laboras por la fajro. Laŭ ĉi tiu profetaĵo, la du mil jaroj, kiuj estas pasintaj ekde la unua alveno de Jesuo Kristo, estas ĉe Dio kiel la pasintaj kvardek ok horoj ĉe ni. Dio deziras doni al ĉiuj homoj tempon por penti kaj forlasi siajn pekojn. Tiuj, kiuj pentas kaj fidas je Jesuo, kiel sia Savanto havos lokon en Lia eterna regno. Nia espero devas esti ĉe la reveno de Jesuo Kristo kaj la nova ĉielo kaj la nova tero, “en kiuj loĝas justeco.”

ekster la glacio. La fremduloj estis konsternitaj kaj furiozaj pro trovi tion kion ili nek esperis nek deziris vidi. Ili forprenis iujn ĉarpentlignojn kaj penis bruligi ilin, sed la ligno estis tiel ŝtonigita ke la fihomoj malsukcesis. Tiam la sciencistoj ĵuris ke se unu el ili diskonigus tion kion ili trovis ke tiu individuo estos torturita kaj murdita. Ili same minacis Haji Jeram-on kaj lian patron se ili ne silentus pri la afero. Tial, S-ro Jeram ne rakontis la historion al iu persono ĝis kiam lia morto alproksimiĝis. Du jarojn poste, en 1918, mallonga artikolo aperis en la ĵurnaloj citinte scienciston mortantan en Anglujo kiu rakontis la saman historion kun la

sama informo kiun Haji Jeram estis rakontinta.

Ĉi tiuj pruvoj montras ke la Arkeo ankoraŭ ekzistas. La historio pri Noa kaj la Diluvo ne estas legendo. La mondo de tiu tempo estis juĝita kaj punita pro sia malboneco kaj perforto kiel la Biblio diras. Denove, ni vidas ke la Biblio estas la Vorto de Dio kaj ke ĉi tiu fakto estas apogata de firmaj historiaj pruvoj. Tial, ni devas atenti ĉi tiujn vortojn de la apostolo Petro pri la reveno de Jesuo Kristo al la mondo.



Nova vivo

Honoré SEBUHORO, Ugando
honsebn@gmail.com

Lam juna knabo devojiĝis en granda urbo. Li forlasis sian loĝejon, kun la intenco viziti siajn familianojn, kaj staris, tremante, timema kiam li vidis multajn rapidajn aŭtojn antaŭ si.

Lia patrino estis ie, ĉi tiu juna knabo ne sciis kiel returni sin al la loĝejo de sia patra onklo.

Tamen, neatendite, lia patra onklo stariĝis flanke de li. Kia miraklo!

– “Mia infano kio okazis? Ĉu vi devojiĝis? Venu, mi vin direktas al la loĝejo” diris la patra onklo.

La juna knabo tremante kaj kun angoro etendis sian dekstran manon al

la patra onklo, feliĉa kaj entuziasma trovi fidelan personon kiu sciis la straton al la loĝejo. La viro ektenis lian manon kaj fine gvidis lin ĝis la loĝejo.

Ĉi tiu eta historio nur koncernas tiujn, kiuj etendas siajn manojn al Jesuo Kristo kredante al li kiel sia savanto. La malforteco de via fido ne estas grava. Necesas nur ke Jesuo Kristo estas fidela kaj havas eblecon savi ĉiujn kiuj venas al la mizerikorda Dio laŭ Lia vojo.



Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanio partopenis en la Evangelia Eklezia Foiro

Hedwig FISCHER, DE

sekretario de la Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanio

Por karakterizi la Evangelian Eklezian Foiiron okazintan de la 1a ĝis la 5a de majo en Hamburgo la plej trafa adjektivo ŝajnas esti “serena”. Ne nur ke suno kaj milda vento zorgis por taŭga vetero, ankaŭ la sinteno de la multegaj vizitantoj kaj kunlaborantoj kaŭzis bonegan etoson. Ĉie en la urbo videblis la bluaj flagoj kun la moto “Kiom vi bezonas”. Kaj montriĝis, ke oni ĉiam kaj ĉie pretis pripensi kaj

demandojn kaj kunportis informmaterialon.

Estis ĉefe grizharuloj, kiuj alproksimiĝis kun la demando: “Esperanto? – Ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas?” Kaj ili plejofte daŭrigis rakontante, ke ili en junaĝo almenaŭ multon aŭdis pri Esperanto aŭ eĉ eklernis la lingvon. Sed bedaŭrinde ...

La junaj homoj, kiuj vizitis nian standon, plejofte starigis lingvajn demandojn. Malmultaj volis diskuti kun ni, kial oni entute lernu Esperanton.

Preskaŭ ĉiuj interesiĝis pri la Biblio en Esperanto, impresis ilin ankaŭ nia ekumena kant- kaj preĝlibro “Adoru”. La plej ŝatata teksto ĉe nia stando klare estis la “Patro nia”. Ĝin ni oftege laŭlegis, samtempe klarigante bazajn regulojn de nia lingvo. Ĉar ni sciis, ke en alia halo troviĝis stando de Germana Esperanto-Junularo, kie oni ofertis mallongajn enkondukajn kursojn, ni volonte sendis la junajn scivolemulojn al ili.



Jutta Sülztz (HES) kun junaj klientoj

diskuti la moton.

La gaja etoso sentebis ankaŭ ĉe nia stando, kiu troviĝis en la temaro “spiritualeco”, kodvorto “ekumeno vivanta”. Kunlaboris kun mi ses Hamburganoj (ne nepre eklezianoj) kaj Japano, loĝanta en Frankfurt/Oder. Dum tri tagoj preskaŭ ĉiam staris interesiĝantoj antaŭ niaj afiŝoj kaj libroj, starigis inteligentajn

Goro Kimura (Japanujo) kun tri junulinoj



Minimume trifoje venis maljunulino dirante ke ŝi jes konas Esperanton, tamen mem ne parolas, sed la nepo/nepino/filo kun familio ... Ili ege ĝojis kiam ni povis diri, ke lin/ŝin/ilin ni kompreneble konas. Min persone ĝojigis, ke vizitis nian standon kelkaj membroj de nia “Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanio”. Parte mi ĝis tiu vizito ne konis ilin.

Resume mi ŝatus diri, ke regis gaja etoso, alparolis nin homoj afable, kelkaj eĉ laŭdis nin pro nia engaĝiĝo, kaj ni sukcese plenumis nian taskon, montri al la Kristanoj, ke Esperanto vivas kaj taŭgas por liturgio kaj aliaj teologiaj kampoj.

La “Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanio”, landa sekcio de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) klopodas ja en du direktojn: unuflanke ĝi reprezentas kaj konfesas Kristanan kredon inter la Esperantistoj, aliflanke ĝi varbas por Esperanto inter la Kristanoj.

Kiel unu el la plej favoraj medioj por la tia varbado montriĝas la Evangelia Eklezia Foiro. Jam dum multaj jaroj la Germana KELI-sekcio regule partoprenas. Sed prizorgi informstandon apenaŭ eblas sen helpo de la ĉelokaj Esperantistoj. La membroj de HES

Wilhelm Sprick (Hamel), Jutta Sultz (HES), Hedwig Fischer (KELI), Gerald Roemer (HES)



(Hamburga Esperantista Asocio) modele subtenis nin. Mi ŝuldas grandan dankon al la ses Hamburgaj Esperantistoj kaj al la Japano, kiuj fidele helpis ĉe la stando, eĉ transprenis pli da laboro, kiam du anoncigitaj homoj malsanis.

La venonta Evangelia Eklezia Foiro cetere okazos en la jaro 2015 en Stuttgart.



Plena agado



Plena agado



Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, VIII b

Medicino, mistiko, muziko – Albert Schweitzer

DUDICH, Endre, HU

2 Albert Schweitzer

(Kaysersberg 1875 – Lambarene 1965)

*“Esti homo malfacilas,
sed esti io alia ne indas.”*

Albert Schweitzer naskiĝis la 14-an de januaro 1875 en eta germana vilaĝo de Rejnlando, Kaysersberg, kie lia patro, **Ludwig Schweitzer**, estis protestanta pastoro. **Albert** havis tri fratinojn kaj unu fraton. Duonjaron poste la familio transloĝiĝis en alian vilaĝeton, Gunsbach, proksime al urbo Münster.

Fininte la mezlernejon en Münster en 1893, li veturis Parizon, por lerni artan orgenludadon. Poste li studis teologion kaj filozofion en la universitato de Strasburgo, kaj iĝis pastoro de la tiea preĝejo Sankta Nikolao.

En 1904, leginte varbantajn flugfoliojn de *Luterana Misia Societo* en Parizo, **Albert** decidis iĝi kuracisto, por helpi la suferantajn homfratojn. Li studis medicinon ekde 1905 ĝis 1911, kun speciala atento al la tropikaj malsanoj.

Li ankaŭ konstruis orgenojn. Lia verko pri **J. S. Bach**, aperinta en 1905-1908, akiris al li kaj al la lejpciga majstro multajn admirantojn. Li verkis ankaŭ pri teologio kaj filozofio. Tiujn verkojn karakterizas protestanta liberalismo.

En 1913 **A. Schweitzer** edziĝis al

Helene Bresslau, kaj ili kune veturis al Afriko. En la vilaĝo Lambarene (Gabono) **Schweitzer** fondis malsanulejon por prizorgi, flegi kaj kiel eble kuraci la malriĉajn, eĉ neniohavajn nigrolojn.

La unua mondmilito ŝanĝis la situacion. Estante germana civitano, la instancoj de Gabono, kiu tiam estis franca kolonio, en 1915 malpermesis al **Schweitzer** praktiki medicinon. En 1917 la francoj sendis lin kaj lian edzinon en Francion, kaj unue internis ilin, poste fermis en tendaron de militkaptitoj en Saint Rémy. En 1918 ili ricevis permeson returni al la vilaĝo Gunsbach. Tie naskiĝis en 1919 ilia filino **Rhena**.

Post la packontrakto de Versailles (1920), **Albert Schweitzer** – jam franca civitano – iĝis helpkurcisto en la hospitalo de Strasburgo, kaj denove ankaŭ



pastoro de la preĝejo Sankta Nikolao. La universitato de Zuriko en la sama jaro elektis lin Honora Doktoro. Ĝis 1924 ili nelacigeble rondvojaĝis en Eŭropo, prelegante kaj koncertante.

En 1924 ili revojaĝis al Lambarene, kaj restis tie ĝis 1948. Poste **Schweitzer** aktivis en Eŭropo kontraŭ la atom-bombo. En oktobro 1953, li ricevis Nobel-premion pri paco.

Helene forpasis en 1957, kaj **Albert** en 1965. Ili ambaŭ ripozas en la tombejo de Lambarene.

Okaze de lia entombigo, la reprezentanto de la registaro de la jam sendependiĝinta Gabono nomis lin *“la plej respektinda, tutmonde plej estimata, kaj plej aĝa civitano de Gabono.”*

Albert Schweitzer havas buston en Budapeŝto, hospitalo portas lian nomon en urbo Hatvan (60 km oriente de Budapeŝto), kaj eĉ kamera orkestro adoptis lian nomon.

Iu konsideras ke li estis protestanta sanktulo. Aliaj, male, emfazas ke *“li tute ne estis sanktulo.”* Ili riproĉas al Schweitzer ke li traktis la nigrulojn kiel mense handikapulojn. De tempo al tempo en Lambarene aperis surskriboj: *“Schweitzer iru hejmen!”*

Verkoj de Albert Schweitzer

- Johann Sebastian Bach, la leĵpciga majstro
- Esploroj pri la vivo de Jesuo
- La mistiko de apostolo Paŭlo
- Rande de la praarbaro
- Respekto de la vivo 1915
- Leteroj el Lambarene
- Alvoko al la homaro
- Kulturo kaj etiko
- Mia vivo, miaj pensoj



El nia arĥivo –
Dia Regno 1967, nr 11

Sur recepton

Past. Jozsef Farkas, en “Reformétusok Lapja”
(el la hungara, E.F./A.B.)

Kiel ”kurac-indikon” por multaj malsanaj homoj oni devus skribi ĉi tion: “Lernu Esperanton!” Tiel deklaris antaŭ nelonge unu entuziasma instruistino de la internacia lingvo. En ĉi tiu penso estas frapa ne tio, ke eĉ malsana homo povas ellerni tiun facilan lingvon, sed tio, ke homo komencanta

lerni ĝin eĉ resanigas el sia malsano. Kompreneble tiu lingvo-instruistino ne pensis pri ‘korpaj malsanoj postulantaj intensan intervenon, sed pri la karakterizaj animaj malsanoj de la moderna homo – pri la minusa komplekso, mishumoro, la turmenta sento de forlasiteco, pri la kompleta manko de mem-estimo ktp.

Por pruvi sian aserton, ŝi citis longan vicon da ekzemploj. Ŝi parolis ekzemple pri vigla edzino de pensiita viro, kiu enverŝis siajn energiojn, ĝis eksplodo kunpremitajn, en la kadron de la “lingvolerna uzino”, kaj nun, kiel flanka produkto, el tiu 61 “entrepreno”, naskiĝis gajo, vivĝojo, entuziasma celkonscio. La sola, tre zorge edukita filo de iu vidvino forlasis la gepatran landon kaj poste baldaŭ forgesis sian patrinon. La senespera, viv-enua virino enmiksiĝis en iun esperantistan grupon, kaj tuj ŝi trovis okupadon, taskon, celon por sia soleca vivo, apude ŝi ricevis aldone geamikojn, “familion”, amon en la nova medio. Iu junulo faris studan planon por si mem, kiu superis liajn fortojn. Li ne povis daŭrigi la studadon kaj tio tute deprimis lin. Liaj amikoj logis lin en la rondon de la lingvo-gelelernantoj, kaj de tiam reordigis lia vundita memkonscio.

Tiu entuziasma esperanto-instruistino klarigis, ke tiu praktika arta lingvo havas tiajn sanigajn psikologiajn efikojn pro tio ke en ĝi oni povas eksterordinare rapide atingi certajn plaĉ-aspektajn sukcesojn. Post kelkaj lecionoj oni jam povas kunmeti frazojn el la simplaj vortoj, povas komenci korespondi kun la ĉie troveblaj entuziasmaj lingvo-fratoj en la tuta mondo, ktp. La plimulto de la aliaj lingvoj estas plena de malfacilaj reguloj kaj eĉ pli malfacilaj esceptoj, kaj tial multe da homoj post kelkaj horoj jam senkuraĝige ĉesigas la lingvolernadon. Dume, ĉi tie la rapidaj sukcesoj donas kvazaŭ flugilojn al tiuj anoj, kiuj havas nur pli malfortan kapablon kaj pli malgrandan vol-forton.

Tio meritas pripenson: Esperanto estas surskribinda sur “recepton”, ĉar kiel “flanka produkto” de la lingvolernado rezultas jeno: a) La lernanto fariĝas aktiva kaj lia tuta vivo akiras serenan vivimpeton. b) Li alvenas inter homojn, kaj eĉ laŭmatura ermito gustumas la bonan guston de komunuma vivo. c) La baldaŭ aperantaj sukcesoj entuziasmigas ankaŭ homon kun vundita memestimo al memkonfido kaj novaj esperoj.

Aperas la demando: Ĉu ankaŭ la “kristanismo” estas surskribebla plenrajte sur recepton por la resanigo de homoj, kiuj ricevis vundojn en la vivo? Ja ankaŭ; la kristanismo fariĝis speciala “lingvo” inter la aliaj lingvoj! Abundas en ĝi la parolo, kaj oni devas ellerni tute novajn vortojn – Dio, animo, peko, graco, savo, pravigo, repacigo, ktp. ktp. Ofte ni atentis nur pri tio, ke la homoj bone ellernu tiun “lingvon”, kvankam antaŭ Dio pli gravaj estas la “flankaj produktoj” – la serena viv-impeto, la entreprenita komunuma vivo, la ĝusta memtakso, la helpemo al la aliaj, la bonvolo – pli gravaj ol la preciza “lingvoscio”. Sur tiu kampo, la diligenta ekzercado de la pia lingvo ne estas fincelo en si mem. Ĝi estas nur ilo por atingi la verajn rezultojn.

Ni devas esperi kaj klopodi al tiu direkto, ke plejeble baldaŭ alvenu la tempo, kiam la homoj tiel parolos pri la anime vunditaj: Al tiu ĉi senkuraĝa amara homo oni devus surskribi sur recepton iom da “kristanismo”, tio certe reordigus lin kaj farus lin denove serena, feliĉa homo. ☪

Kara redaktoro,

Hodiaŭ mi legis DR 2/2013 kaj volas aldoni rimarkon, ĉar via titolbildo temas pri la ŝtonumigo de Stefano, kiun ĉeestis Saŭlo/Paŭlo. Poste mi ne legis en la gazeto eĉ unu vorton pri tio. Ankaŭ ĉe la artikolo de Berveling mi trovis nenion kompareblan. Se tio estas korekta, vi certe havas ion por la venonta DR. En la germana vikipedio mi trovis ion taŭgan kaj mi el tio ĉerpas (bazita sur la germana teksto kaj tradukita per la helpo de Guglo):

Persekutanto de kristanoj

Paŭlo sekvis sian konvertiĝon de strikta fariseismo, kiu postulis ke prozelitoj (kiuj konvertiĝis al judismo, ne-judoj) estu cirkumcidataj (Agoj 15,5). Li vidis sin kiel “fervorulo de la leĝo” (Gal. 1,14), kies regulojn ankaŭ la konvertitaj ne-judoj tute plenumu (Fil 3,6). En ĉi tiu persekutado li iĝis amara kontraŭulo de tiuj helenismaj judaj kristanoj kiuj faris misiistan laboron en la juda diasporo, dum novbaptitaj ne-judaj kristanoj dum la obeado al la Tora, ne devis fari cirkumcidon.

Laŭ Luko, Paŭlo ĉeestis la ŝtonmortigon de Stefano, la unua kristana martiro (Agoj 7,58). Tiu aperis kiel la proparolanto de la grupo de grekoj, kiu komencis en la pra-komunumo en Jerusalemo la unuan mision al la nacioj kaj kiu la templan kulton rifuzis kaj tiel venis en konflikton kun la sadukeaj templaj pastroj.

Kie Paŭlo parolas pri sia eksa kristana malamikeco, li emfazas, ke li por la unua fojo vojaĝis al Jerusalemo tri jarojn post sia konvertiĝo. La eklezioj en Judo ne konis lin antaŭe (Gal 1,18.22). Do la akuzo estis probable nur la judaj membroj de la helenismaj kristanaj komunumoj ekster Palestino, kiuj ne strikte sekvis la Toraon.

Paŭlo estas elstara reprezentanto de la kristanismo. Sed antaŭ la konvertiĝo li estis Saŭlo, leĝofidela judo, kiu persekutis la kristanajn komunumojn helenismajn, kiuj ne plu estis leĝofidelaj. Se vi en DR per bildo memorigas la ŝtonumigon de Stefano kiel unuan martiron, oni ne forgesu la kontribuon kaj la ĉeeston de Saŭlo pro du kaŭzoj:

- Stefano preĝis por siaj murdistoj kaj ankaŭ por Paŭlo.
- Dio plenumis la porpeton kaj konvertigis Saŭlon al Paŭlo.

Malfermu vian Biblion kaj legu:

Agoj 7,54 Morto de Stefano

Agoj 8 Persekuto de la komunumo en Jerusalemo

Agoj 9.1 Konvertiĝo de Saŭlo.

Tre kore salutas
Siegfried KRÜGER

SVITAVY 2013

Por multaj esperantistoj estas urbo Svitavy ligita kun Esperanto muzeo. Ĝi troviĝas en tipa konstruaĵo, kiun donacis al la urbo mecenato Valentin Oswald Ottendorfer (naskiĝinta en Svitavy) vivanta tiutempe en Usono. La domo estis konstruita dum la jaro 1891 kaj solene malfermita 21. 8. 1892 kaj ĝi funkciis kiel publika biblioteko, siatempe plej granda germanlingva biblioteko en Moravio. En la domo troviĝas reprezenta koncerta salono.

Muzeon kaj salonon Vi povos viziti dum ĉi-jara KELI kongreso (3. – 10. 8.) Se Vi ankoraŭ ne aliĝis, Vi povas tion ankoraŭ fari, ĉar restas kelkaj liberaj lokoj en la studenta hejmo. Do, aliĝu rapide – urbo Svitavy atendas Vin. Informojn kaj aliĝilojn sendos al Vi Pavel Polnický (adresoĵ sur dua kovrilpaĝo).



Aliĝintoj al KELI-kongreso Svitavy, 3. – 10. aŭgusto 2013

1. Stamm, Sieglinde	AT	19. Ráczevny-Eötvös, Ágnes	HU
2. Hamajdová, Jaroslava	CZ	20. Åradsson, André	SE
3. Oláh Margit Judit	RO	21. Åradsson, Bengt Olof	SE
4. Popoviciu, Eugenia Ecaterina	RO	22. Chrdle, Petr	CZ
5. Farkas, Antal	RO	23. Schaeffer, Hedwig	DE
6. Polnický, Pavel	CZ	24. Schaeffer, Karl H	DE
7. Bagi, Irén	HU	25. Filepp, Zita A. V.	RO
8. van Dijk, Els	NL	26. Tuinder-Dekker, Vera	NL
9. Borsboom, Ed	NL	27. Tuinder Jef,	NL
10. Birta, Sabolciu	RO	28. Dubinová Jindřiška,	CZ
11. Pospíšil, Václav	CZ	29. van Ganswijk, Wil	NL
12. Cousson, Philippe	FR	30. Rohloff, Wolfram	DE
13. Ojasild, Endel	EE	31. Lepping, Stefan	DE
14. Ojasild, Joonatan	EE	32. Cayzac, Hanna	FR
15. Scurt, Terezia Ildiko	RO	33. Farkas, Eva	HU
16. Laszlo, Maria	RO	34. Klimeš, Pavel	CZ
17. Sandoz, Andreo	CH	35. Polnický, Tomáš	CZ
18. Krüger, Siegfried	DE		

KORESPONDEMULOJ !

Salutojn:

Mia nomo estas Viana Ibert Williams, mi estas kristano, kaj mi partoprenas kun mia familio en la Preĝejo Pentekosta de Cienfuegos, Kubo. Mi volas kontaktiĝi kun evangeliaj kristanaj esperantistoj de diversaj landoj.

Pri mi: Mi nomiĝas Viana Ibert Williams kaj mia patrino estas Diana Williams Serrano. Mi havas 14 jarojn kaj ŝi 54 jarojn. Mi lernas muzikon kaj mia instrumento estas la violonĉelo kaj mia patrino estas dekoracisto, radioamatoro kaj havas artriton en la manoj (sed en la nomo de Dio ŝi estas sana)

Nia adreso: sandraws@jagua.sld.cfg.cu

Calle 57 entre 40 y 42 Edificio 2 Apartamento 2 Cienfuegos, Cuba

Telefono:(043)557013 +5358165569

Bone mi atendas vian respondon.

Dio benu vin!
Viana

Tagordo por la jarkunveno de KELI 2013

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de kunprotokolantoj
- 3 Akcepto de la tagordo
- 4 Komunikoj
- 5 Funebra memorigo
- 6 Sekretaria jarraporto
- 7 Kasista jarraporto
- 8 Raporto de la kaskontrolantoj
- 9 Diskuto kaj akcepto de la raporto
- 10 Buĝetoj
- 11 Raporto de la redaktoro de DR
- 12 Estrarelekto
- 13 Kongresplanoj
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
- 15 Fermo

Klarigoj:

(12) *Ĉi-jare finiĝas la deĵorperiodo de Philippe Cousson kaj Samuel Gaillard – ambaŭ estas reelekteblaj*

Financa raporto de KELI 2012 (Ĉiuj sumoj en EUR)

		Bilancoj fine de la jaroj	
		2011	2012
Aktivoj			
	Stokoj de libroj	5.260,75	5.260,75
	Stoko de kasedoj, E-Misio	<u>116,00</u>	<u>116,00</u>
	<i>Provizo</i>	5.376,75	5.376,75
	Postuloj (IKUE, UK-lukosto)	70,00	
	Kasista kaso	77,99	29,00
	Sekretaria kaso	44,00	464,80
	CIC ĝir-konto	799,47	731,69
	CIC ŝpar-konto	36.351,05	35.235,04
	UEA-konto kelk-p	<u>6.041,93</u>	<u>7.179,66</u>
	<i>Monrimedoj</i>	43.384,44	43.640,19
	Sumo de aktivoj	48.761,19	49.016,94
Pasivoj			
	Kapitalo	18.172,59	18.623,14
	Rezulto de la jaro	450,55	1.623,13
	<i>Kapitalo entute</i>	18.623,14	20.246,27
	Dumvivaj membroj	2.327,64	2.211,26
	E-Misio	6.894,51	6.894,51
	Helpa kaso	3.412,60	3.412,60
	Kongresa rezerva kaso	1.823,48	1.823,48
	Literatura/Himnara kaso	<u>12.941,57</u>	<u>12.941,57</u>
	<i>Fondusoj entute</i>	27.399,80	27.283,42
	Evidente	603,00	1.242,00
	Kreditoroj (brita kaso)	95,25	95,25
	Kongresaj kotizoj	1.900,00	150,00
	Antaŭricevitaj kotizoj	<u>140,00</u>	<u>0,00</u>
	<i>Transitaĵoj kaj pasivoj</i>	2.738,25	1.487,25
	Sumo de pasivoj	48.761,19	49.016,94

Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2012-12-31

Aktivoj

Stokoj

En la lastaj kvar jaroj la vendado de la stokoj entute estis preskaŭ zero. Estus bone trapensi la veran valoron de nia stoko, kaj eble pli multe sendi al malriĉaj, ne forte kristanaj landoj per la uzado de la Literatura / Himnara kaso.

Postuloj

En 2012 KELI ne havis postulojn de IKUE pro la lu-kosto de la salono dum la Universala Kongreso, ĉar en Hanoio ni ne luis salonon.

Monrimedoj

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös HU, kun malgranda sumo. Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnicky CZ, kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de Dia Regno. KELI havas bankkontojn ĉe la franca CIC banko kaj ĉe UEA (kelk-p).

Pasivoj

Kapitalo

Pasintjare la estraro decidis, ke estonte la legacojn ni montros aparte dum tri jaroj. Estis decidita, ke kune kun la sumo de la Informada/Varbada kaso, ankaŭ la legacoj estu montritaj en la sumo de la Kapitalo. La rezulto de la jaro 2012 estis 1.612,13 Eŭroj.

Fondusoj

Pasintjare la estraro decidis, ke estas vane aparte montri la sumon de la Junulara helpa kaso, ĝi estu kunigita kun la sumo de la Helpa kaso. La helpa kaso estas por la helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson.

Transitaĵoj kaj pasivoj

EVIDENTE: 1.242 Eŭrojn la membroj donacis al Evidente je la fino de la jaro. La sumo jam estas transkontigita al la fonduso Zienderogen. La brita sekcio pagis antaŭ jaroj 95,25 Eŭrojn, ili ankoraŭ ne decidis pri la konkreta celo de tiu ĉi mono. Kongresajn kotizojn (aliĝ-kotizojn) al la kongreso 2013 kelkaj membroj pagis en 2012. Membrokotizoj sekve estos librotenataj en tiu jaro, kiam ĝi estas pagitaj.

Rezulto 2012 kaj buĝetoj 2012, 2013 kaj 2014 (Ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2012	Rezulto 2012	Buĝeto 2013	Buĝeto 2014
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	2.700	2.694,08	2.750	2.700
Kotiz- kaj kursdiferencoj	0	0		
Adopta Kaso	600	1.007,03	700	800
<i>Kotizoj entute</i>	3.300	3.701,11	3.450	3.500
Librovendado	100	14,00	100	50
Rentumoj	600	883,99	600	850
Profito el kongreso	100	335,00	200	200
<i>Aliaj enspezoj</i>	800	1.232,99	900	1.100
Enspezoj entute	4.100	4.934,10	4.350	4.600
Elspezoj				
Presisto kaj sendado de DR	3.100	2.848,00	3.200	3.000
Perantoj	10	0,00	10	10
<i>Revuokostoj</i>	3.110	2.848,00	3.210	3.010
Prezidanto	20	0,00	20	20
Sekretario	65	65,00	70	70
Redaktoro	250	0,00	250	250
Kasisto/Matrikulisto	20	0,00	20	20
<i>Estrarkostoj</i>	355	65,00	360	360
UEA-kotizo	60	61,00	60	60
Ĉambro de Komercio	0	0,00	0	0
Kaskontrolo	200	188,99	50	50
Bankkostoj	120	147,98	130	150
Merituloj	50	0,00	60	60
UK Lukostoj	70	0,00	70	70
<i>Generalaj kostoj</i>	500	397,97	370	390
Librovendado (kostoj)	90	0,00	90	90
Varbado (Inf./varba kaso)	20	0,00	20	20
Rabatoj de Perantoj	10	0,00	10	10
<i>Aliaj elspezoj</i>	120	0,00	120	120
Elspezoj entute	4.085	3.310,97	4.060	3880
Saldoj	15	1.623,13	290	720

Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2012 kaj la Buĝetoj 2013/2014

Enspezoj

Kotizoj

La Kotizoj estis punkte planitaj, sed al la Adopta Kaso alvenis pli da mondonacoj. La Adopta Kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui “laŭforte”. Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj. En 2012 enfluis 1.007,03 Eŭroj.

Aliaj enspezoj

La sumo de Librovendado estis multe pli malalta ol la planita sumo, sed la Rentumoj kaj la Profito el kongreso estis pli altaj ol la planita sumo.

Elspezoj

Revukostoj

La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon.

Estrarkostoj

En 2011 la kostoj de la Redaktoro kovris du jarajn kostojn, pro tio en 2012 tiu ĉi rubriko ne havas sumon.

Ĝeneralaj kostoj

Tiu ĉi kategorio havas en 2012 UEA-kotizojn, la kostojn de la Kaskontrolo kaj la Bankkostojn.

Aliaj elspezoj

En la jaro 2012 KELI ne pagis aliajn elspezojn.

Saldoj

La saldo de la jaro 2012 estis multe pli granda ol ni kuraĝis plani, kaj la planita saldo por la jaroj 2013 kaj 2014 montras, ke la financa bazo de KELI daŭre estas kontentiga.

informejoj

Ĉerpo el la

prelego de Humphrey Tonkin dum la germana E-kongreso en Nurenbergo 2013

videbla ĉe: www.youtube.com/watch?v=loEVZ5wDUgs

...ni mem havas respondecon dediĉi pli da energio al la vivtenado de nia lingvo mem. Min konsternas la malalta nivelo de scio de Esperanto flanke de multaj eĉ aktivaj esperantistoj. Kiom da novaj vortoj vi lernis hodiaŭ? Kiom da komplikaj konversacioj vi partoprenis? Kiom da paĝoj legis? La elektronikaj kanaloj faciligas la lernadon de Esperanto, sed ili ne faciligas la perfektigon, en la senco, ke

eĉ plej balbutaj esperantistoj povas elturniĝi en simplaj interkomunikaj retaj.

Memoru: ni ne havas denaskajn parolantojn (almenaŭ ne en signifa kvanto). Aliaj minoritataj komunumoj naskas siajn parolantojn; ni plejparte ne. La etiko de esperantisteco postulas, ke vi pli bone lernu la lingvon, pli ofte utiligu ĝin, kaj pli ofte ebligu tiun uzadon al aliaj.



Berend Opheikens

La 21-an de majo mortis nia membro Berend Opheikens je la aĝo de 84 jaroj. Pro anemio kaj kormalfacilaĵoj li estis kelkajn tagojn en malsanulejo, sed neatendite li tie forpasis, ok monatojn post la forpaso de sia edzino.

Li interesiĝis pri lingvoj kaj sekve de tio li lernis Esperanton, parte memstare, parte kiel kursano de mi. Li trovis baldaŭ korespondamikojn, unu en Kubo kaj aliajn en la Ukraino, Belgio kaj Orient-

eŭropo. Li intencis viziti la klubkunvenojn de la groningenena klubo kaj volonte partoprenus KELI-kongreson, sed tio ne okazis. Pli bone ol paroli Esperanton li povis senerare traduki kaj skribi Esperanton kaj li estis entuziasma pri la lingvo. Mi ĉeestis la adiaŭan diservon.

Ni esperas, ke li ripozu en paco.

Wil van Ganswijk-Vlasblom.

Invito al

Internacia seminario — La Religio Kaj La Homaro 01-05 julio 2013, Karlovo

“La religio kaj la homaro” kunlige kun la scienca simpozio AEPA-2013, dononte eblecon ankaŭ al scienculoj parte partopreni nian religian seminarion kaj pridiskuti teologiajn temojn.

Kun estimo kaj plej koraj salutoj Prof. Boĵidar Leonov

Informiĝu ĉe: leonov@rozabg.com

Bazaj informoj jene:

Organizantoj: BEA, AIS- Bulgario, Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista /TOLE/, Internacia Universitato Karlovo kaj la Regiona Estraro de la ne-esperantista organizo “Scienc-teknika Asocio en Bulgario”

Honora protektanto: D-ro Emil Kabai-
vanov, Urbestro de komunumo Karlovo

Oficiala lingvo: Esperanto

Laborlingvoj: krom Esperanto ankaŭ
naciaj lingvoj de la partoprenontoj ne-
esperantistoj

Rimarko: Tiuj, kiuj ne havas eblecon
partopreni la tutan Simpozion, povus
partopreni nur parte dum preferindaj
tagoj. La partoprenontoj ne estos de-
vigotaj prelegi. Povus partopreni nur la
diskutojn.

Aliĝo: Aliĝkotizo – 20 eŭroj.

10 eŭroj por eksaj socialismaj landoj kaj
Afriko, AIS-studentoj ne pagas aliĝko-
tizojn

Rimarko: Aliĝkotizo por dezirontoj
partopreni ambaŭ seminariojn-AEPA
kaj la religian dum la tuta tempo de la
restado en Karlovo/29.06-05.07.2013/-

estas nur 20 eŭroj

Limdato por aliĝo: 25.06.2013

La aliĝkotizo estas pagebla per nia
bankokonto aŭ surloke. La aliĝontoj
estas petataj nur sendi la aliĝilojn ĝis la
menciita limdato.

Numero de la bankokonto: /en eŭroj/
UNICREDIT BULBANK 7 Sv. Nedelia
Sq. 1000 Sofía, Bulgaria
SWIFT BIC CODE UNCRBGSF

IBAN BG 12 UNCR 9660 4422 0221 08

Kotizoj por unu tranokto: 7 eŭroj/en
komuna loĝejo/ 25-40 eŭroj /en hoteloj/
Antaŭ kaj postseminaria ripozo: en
Karlovo kaj ĉe la Nigra maro dezirontoj
povus ripozi pagonte surloke malmulte-
koston tranoktadon.

Vizoj: post la aliĝpeto ni sendos al la
dezirontoj invitilojn por la bulgara vizo.

Adreso por aliĝo kaj informoj:
Bulgario 4300 Karlovo p.k.44
ESPERINFORM

Retadreso: leonov@rozabg.com
/preferinde skribu rete /

Telefonaĵoj: +359 885056469 /tage kaj
nokte/ +359 335 5-50-50/nur vespere/



En Kristo feliciĉaj

(originale verkita)



1. En Kris-to fe - li - ĉaj, kun li en li - ber',
2. Nu - tri - taj de Di' ki - el tur - do aŭ fring',
3. He - rol - di ni vo - las per sim - pla vi - vad',



ni es - tas la lu - mo, la sa - lo de l' ter',
ves - ti - taj en bel' ki - el roz' aŭ si - ring',
sen mal - to - le - re - mo, al - trud' aŭ per - svad'.



la lam - po sur in - go, la ur - bo sur mont',
sen zor - go pri mor - gaŭ, sen tim' an - taŭ plag',
Nur ĝoj' nin ple - ni - gas, nur am' kaj es - per'.



la do - mo sur ro - ko, la ak - vo el font'.
fi - dan - taj al Di - o de ta - go al tag'.
En Krist' ni fe - li - ĉas: Li es - tas li - ber'.

EN KRISTO FELIĈAJ • M kaj E (originale verkita, ĉefe laŭ motivoj de la
Surmonta Prediko): Albrecht Kronenberger 2013-04-07